

Francilia federacio

Komitatkunsido 19/03/2022

Partopreno

- Pierre Gauthier, eks-vic-kasisto (PG) ĉeestas
- Marc Giraud, eks-prezidanto (MG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aleks Kadar (AK) ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, eks-kasisto (DL) ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers, eks-sekretario (LPI) ĉeestas
- Marianne Pierquin (MP) ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) sin ekskuzis kaj transdonis rajton al MG

Ekde la antaŭa KK

La protokolo de la KK de la 28/01/22 estis aprobita kaj enretigita al <https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj>

Dum tiu KK estis decidite donaci 1.000€ al edukado.net (<https://edukado.net/prie/subteno>) : petite per Arturo ĝiri al la UEA-konto fedu-h kiel "Subteno por edukado.net"

kaj 50€ al Framasoft (<https://framsoft.org/fr/#support>) : ĵus farite de DL per propra Paypal.

La Ĝenerala Asembleo 2022 ĵus okazis, la protokolo estas finpreparota.

Elekto de la estraro

- prezidanto, kandidatoj : MG
- vic-prezidanto (nede vigi), kandidatoj : MP
- kasisto, kandidatoj : DL
- vic-kasisto (ne devigi), kandidatoj : PG
- sekretario, kandidatoj : LPI
- vic-sekretario (ne devigi), kandidatoj : AK

Ĉar ne estas pli ol unu kandidato por ĉiu posteno, la voĉdono okazas pri la tuta estraro kiel bloko.

Jes= 10

Ne= 0

Sindeteno= 0

Voĉoj entute= 10

Rezulto: la nova estraro estas aprobita.

Gratulon al la nova estraro.

La sekretario sendos al Esperanto France la listojn de la nova komitato kaj nova estraro, kreos oficialan protokolon de la lasta ĜA kaj posta KK, oficialigos ĉe la Préfecture de police kaj poste donos al la nova kasisto por la banko

Reprezentanto ĉe Esperanto France

PG iĝas reprezentanto de nia federacio ĉe Esperanto France. Gratulon al PG.

Dum la kongreso en Trelissac, DL eble povos anstataŭigi lin.

Respondeculoj pri informkanaloj

La unua kanalo estas la retejo <https://esperanto.paris> la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- Retejo DJ
- Facebook MG DL MP
- Twitter.com/esperanto_paris PG
- Dissendolisto Amikaro LPI (MG)
- Telegramo AL
- Amikumu MG
- Eventa Servo MG AK (MP)
- Duolingo (nuntempe nur pri retaj eventoj) LPI
- Meet-Up DJ

Kursoj

- 1a nivelo kun MG, rete, marde vespere, 5 studentoj
- 2a nivelo kun MG rete, marde vespere, 4 studentoj
- 2a nivelo kun MAS surloke en la sidejo, ĵaŭde vespere, 2 studentoj
- 3a nivelo kun FLJ surloke en la sidejo, marde vespere, 6 studentoj
- café croissant espéranto kun GVN surloke en kafejo, sabate matene, varia nombro, varia nivelo

La prezo estas: 0€ por la retaj kursoj kaj café croissants espéranto kaj 80€ por la surlokaj kursoj en la sidejo. Rabatita prezo 50€ estas por junuloj (ĝis 35jara) aŭ senimpostuloj. La studentoj de surloka kurso ricevas

senpagan libron (maksimume 30€) el la libroservo de Espéranto-France. Ĉiuj studentoj devas aliĝi al nia federacio per aliĝo al Espéranto France.

Diskuto pri ŝango en la prezo de la kursoj.

Post voĉdono, ni konservas la retajn kursojn senpagajn.

Post voĉdono, ni malaltigas la prezon de la surloka kurso al 50€, kaj la prezo kun rabato al 25€ por junuloj kaj senimpostuloj. Ne plu estos donaco de libro. Restas la devigo aliĝi al nia federacio.

Ni decidis proponi la rabatitan prezon de la surloka kurso (25€) ankaŭ al la publiko de la retejo IDF-mobilité <https://www.iledefrance-mobilites.fr/actualites/avantages-culture-navigo-musee-theatre-opera-chateau> Kial proponi la rabaton en tiu retejo? Por reklami pri Esperanto en tre vasta publiko. La rabatoj de la retejo IDF-mobilité validas por ĉiuj vojaĝantoj de franciliaj publikaj transportoj kiuj havas "Navigo" monatan aŭ jaran abonon, tio estas 4 milionoj da homoj. Nia rabatita prezo 25€ validos por novaj studentoj (neniam studis en la kurso) kiuj aliĝas al surloka kurso kaj, aliĝante, spontanee prezentas sian Navigo abonon. DL prizorgos la aferon.

GVN ofte kreas entuziasmon en siajn studentojn sed poste nenio sekvas. Kiel allogi la interesatojn? Ĉu aligi ilin en la dissendoliston Amikaro, kiu informas pri eventoj? Ne, pro la tro oftaj kaj longaj mesaĝoj. Ni plu serĉu taŭgajn solvojn.

Por la jaro 2022-2023 estas antaŭvidataj ŝanĝoj pri la loko aŭ gvidisto de la kursoj, la afero restas pritraktenda dum venonta KK.

Respondeculoj pri agadoj

- Ĝemelurbo kun Romo: MG
- Legoklubo: MG
- Ludoj: AL kun Marielle Martin
- Ekzamenoj (nur por reklami kaj helpi al preparado al ontaj retaj ekzamenoj): FLJ
- Esperantokafejo: GVN
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier
- Filmade de humura skeĉo: FLJ, LPI, Régis Fournier
- Ĥoro: MG (kiam eblos)
- Prelekturtoj (kiam eblos): FLJ

Post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org por publikiĝo en la reta montata gazeto Esperanto-Aktiv

Projektoj

- Matematika foiro: FLJ pretas prizorgi se estos sufiĉe da homfortoj
- Kontakti la mezlernejojn: GVN intencas fari en 2022

- Kontakti la publikajn bibliotekojn: MP studos la aferon
- Subglasoj: GVN havas la dosieron, la modelo estas elektita, ni atendu la finon de la sana krizo kaj kundividis la elspezon kun Esperanto 94
- Vojaĝoj de Lucien Péraire: okazis prelego, Régis Fournier kreis filmeton, la notoj estas ciferecigitaj, GVN preparas ekspozicion por 2022
- Donaco de libroj al la venonta multlingva biblioteko Livre Ensemble: nuligita
- Ministerio pri financaj aferoj (ties kultura francilia biblioteko "Place des arts"): DL, LPI ni atendu kiam prelego aŭ kurso eblos
- GVN informas pri ekstera, bicikla projekto: <https://univoyage.co/eo/ni-parolu/>
- Organizi Kromajn kursojn por prepari kandidatojn al la KER-ekzamenoj: FLJ (AL pretas sekvi parolan kroman preparan kurson)

Venonta KK

KK okazas trimestre. La venonta KK okazos 10/06/2022 je la 7a ptm ĉu surloke, ĉu rete, ĉu mikse.